

LA CENTROJ KAJ LA SEKCIOJ DE ISAE

Terminologia Centro (TC) de ISAE kunordigas la terminologian esperantistan laboron de unuopuloj, pligrandigante la lingvan riĉecon de Esperanto en diversaj fakoj. TC organizas la diskutadon pri terminologiaj problemoj, kontrolas fakterminarojn, aperigas provizorajn fakterminarojn (kiel rekomendojn de ISAE) kaj rekomendas por la publikigo jam maturajn fakterminarojn.

La aperigataj (multobligataj) terminaroj de TC estas destinitaj al la interna uzo de fakuloj kaj ili estas riceveblaj de TC senpage, kun nur morala devo de la ricevonto subteni (per propra aŭ kolektita monsumo) la fondaĵon »Scienco« (el kies rimedoj oni pagas la multobligadon de la terminaroj).

La direktoro de TC estas dipl. ing. R. Haferkorn (Rehbülstr. 118, 848 WEIDEN, Oberpfalz, Okc. Germanujo).

Traduka Centro de ISAE estas en komenca organiza stato. La celo de la Traduka Centro estas ebligi al ĉiu interesiĝanto havigon de la bezonaj tradukoj de sciencaj artikoloj el nacia lingvo al Esperanto, aŭ per Esperanto el unu nacia lingvo al alia. La fiksota traduktarifoj devus esti iom malpli alta ol la similaj tarifoj de aliaj tradukantoj. *Landaj centretoj* de la Traduka Centro ekzistas en unuopaj landoj, por pli facila efektivigo de taskoj de la centro. La provizora sidejo de la Centro estas en la sekretariejo de ISAE (Zagrebačka 24, SARAJEVO, Jugoslavio).

Arkitekt-konstruista sekcio estas ISAKE (Internacia Societo de Arkitektoj kaj Konstruistoj Esperantistoj). La sekcia kotizo (10 steloj jare) estas pagebla pere de la delegita reto de ISAE (kune kun la jarkotizo por ISAE). La sekcio havas sian komitaton kaj la laborgrupojn en kelkaj landoj. La kontaktadreso estas: Ark. Tekn. Vl. štruceŭj, Krašova 27/IV, ZAGREB, Jugoslavio.

Medicina sekcio estas UMEA (Universala Medicina Esperanto Asocio), kun la propra komitato (la kontaktadreso: D-ro Maria Jarnuszkiewicz, Mazowiecka 69, KRAKOW, Pollando). La sekcio havas sian organon *Midicina Revuo*, kies jarabono estas 15 steloj, pagebla kune kun la kotizo por ISAE (10 st.) kaj kun la sekcia kotizo (5 st. jare) pere de la delegita reto de ISAE.

Filologia sekcio estas IUEF (Internacia Unuiĝo de Esperantistoj Filologoj). La sekretario de la Komitato estas Lj. Marikin, str. Dimo H. Dimov 53, SOFIO 6, Bulgarujo. La sekcia kotizo estas 6 steloj jare (pagebla same pere de la delegita reto de ISAE).

Matematik-fizika sekcio estas ankoraŭ en la organiza stato. La jarkotizo por la sekcio (krom la kotizo al ISAE) 5 steloj. La interesiĝantoj sin turnu al D-ro C. Minaja, Scuola Norm. Superiore, PISA, Italio.

Por la *astronomi-geodezia sekcio* same kiel por la matematik-fizika. La adreso: Prof. B. Popović, Zagrebačka 24, SARAJEVO, Jugoslavio.

SCIENCAJ INFORMOJ

La redaktoro enkondukas ĉi tiun novan rubrikon, kun la peto ke pli multaj personoj kaj el pli multaj fontoj aperigu la interesaĵojn.

*

Tre sentiva aparato, konstruita far fizikistoj en la radiad laboratorio de la usona universitato Notre-Dame, ebligas atentinde precizan tempo-mezuradon, en miliardonoj de sekundo, de la radioaktiva disfalo. (Unu miliardono de sekundo estas la tempero, dum kiu la lumo trakuras distancon de 30 centimetroj.)

*

Helpe de fortaj eksplodoj, kiuj egalas meze intensajn tertremojn, oni elprovas en Taŝkent, ĉefurbo de la sovjeta respubliko Uzbekistan, la rezistivecon kontraŭ sismaj skuoj de novaj pluretaĝaj domegoj, konstruitaj el antaŭ-fabrikitaj elementoj.

*

Por lukti kontraŭ oleo-incendioj okazantaj kelkafoje en oleo-ŝipoj aŭ — rezervujoj, la germana firmo Alco konstruis hidrolike telegvidatan akvo-ŝaumkanonon, kies estinganta maso havas 10-centimetran diametron.

*

Nova presadprocedo, elektrostatika, kiu uzas »sekan presinkon« (ni diru pli bone : prespulvoron) estis patentita en Britujo far la firmo Herox-Rank. Tiu procedo faciligas kaj malpli-kostigas la surpreron de plej diversaj materioj, kaj bone konvenas ankaŭ por marki freŝajn fruktojn.

*

Nova medikamento, nomita »Fasabrin«, kontraŭ la grava okulmalsano »verda glaŭkomo«, estis eltrovata en la Kemia Instituto en Kazan, fare de la sovjeta sciencisto prof. Alexandro Arbuzow, membro de la Moskva Akademio de Sciencoj.

*

Post Venuso kaj Marso nun ankaŭ la planedo Merkuro povis esti telekontaktita helpe de radaro. La perondaj signaloj, elradiitaj far la kalifornia Teknologa Instituto, estis reflektataj de Merkuro, kaj trakuris la 193.600.000 — kilometrojn longan ir — kaj reven-distancon kun lumrapideco (297.600 km per sek.) dum ĉirkaŭ 11 minutoj.